

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Polando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

NIAJ ZORGOJ

La 1. Aprilo kunvenos en Praha la membroj de ĈAE en la IX. jarkunveno por paroli pri la agado en 1927 kaj interkonsiliĝi pri la jaro 1928. Ree ni dezirus, ke la membroj venu al la kunveno kun bonaj pripensoj pri tio, kion ni faru, kiel ni ĝin faru kaj kiuj personoj ĝin faru. La ĝenerala kunveno estas ja forumo, kie devas esti markita la gvida linio por la venonta komitato. Partoprenu do la membroj, kiuj observas la situacion de la movado en ĈSR kaj havas ion por diri. Se ili ne povas partopreni, ili almenaŭ skribe sendu raportojn, konsilojn, proponojn. Certe sufiĉos, se tiuj ĉi venos eĉ en lasta momento, ĉar la kunveno sendube akceptos trakti pri ili.

Al mi ŝajnas, ke ni devus dediĉi nian plenan atenton — kaj laboron — ekz. al la afero de ŝtate ekzamenitaj instruistoj. Kiel aranĝi, ke pliaj geinstruistoj faru la ŝtatan ekzamenon, kaj plie, kion fari por venki la diversajn formalajn barojn, per kiuj diversaj direktoroj, inspektoroj, malfaciligas uzon de la klara dekreto pri ebleco de oficiala instruado de esperanto? Esplori la kaŭzojn, kial instruistoj jam farintaj la ekzamenon, kaj havantaj do formalan eblecon oficiale instrui ne faras tion en mezuro kaj ofteco dizirindaj. Rigardu plie, la staton en la Komercaj Akademioj: en multaj urboj, kie ili troviĝas, ni tute ne havas movadon. Se do ĈAE faros lokan propagandon, unuavice ĝi devus zorgi pri lokoj gravaj el tiu ĉi vidpunkto aŭ la simila. Al tiaj lokoj devas sin energie direkti la gazetara servo, gvidata de persono, kiu havus nenion alian

por fari krom tiu ĉi grava fako. Tiu ĉi servo cetere dependas preskaŭ ekskluzive de la bonvolo de diverslokaj samideanoj, al ĝi mankas gvida persono atente observanta la tut-respublikan gazetaron kaj intervenanta en la nomo de Asocio, kie necese.

Ankaŭ aŭdiĝas voĉoj kiuj deziras fari — kaj sekvi — ian planon por propagando en fakaj medioj. Poŝtistoj kaj fervojistoj, komercistoj kaj studentoj, jam el tiuj ĉi kvar ni povus elekti por la tempo plej proksima.

Tian aŭ similan planon ni faru, ne tro larĝan, sed energie realigatan de personoj kiuj dividu inter si la fakojn, kiuj faru ĉiun laboron, kiuj estu respondaj pri ĝi. Ankoraŭ pri unu eraro mi volus ree atentigi. Ĉiam ankoraŭ ekzistas personoj, kiuj atendas miraklojn de la komitato aŭ de la ĝenerala sekretario, sed mem dum la tuta jaro neniel vidigas emon kunlabori. Asocio estas ni ĉiuj, ne nur la komitato, sed ĉiuj membroj kune. Ne agas bone ekz. instruisto, kiu en siaj fakaj gazetoj aŭ oficiala bulteno ministeria legas ion pri esperanto (ekz. alvokon pri la jubilea ekspozicio en Brno) kaj pere de Progreso ne atentigas pri ĝi, sed plendas poste, ke la alvoko ne estis publikigita.

Jen kelkaj el la zorgoj kaj interesoj de ĉs. samideanoj. Bona solvo de tiuj ĉi punktoj estas por ili pli grava ol ekz. fanatika trudo de tiu aŭ alia formo lingva. Pro tio nur kun sento de abomeno ni legas diversajn cirkulerojn, en kies dissendado trovis plaĉon iuj samideanoj Londonaj kaj Parizaj. Laŭ ni, laboro por venko de esperanto aspektas tute alie.

R. H.

AL JAUME GRAU CASAS.

Amiko belkora, minstrelo de l'amo,
Floranta bukedo de l'kantoj graciaj,
Intimaj kaj bravaj, en suda ornamo,
En freŝo de l'ritmo kaj koremociaj,

La liron serenon, benitan de l'Muzo,
Fiere vi tenas kaj ludas inspire,
Ne vanta gloram, nek ĝua amuzo,
Sed belo perfekta agordas ĝin mire.

Kaj portas tra l'mondo la vent' iberia
La rozajn ĝirlandojn de l'fil' Barcelona
Al bordoj Usonaj, al Nordo glacia,
Al stepoj Taŭridaj, al lando Nippona.

Kaj spiras aromojn tra l'tuta Homujo
La strofoj, abundaj de l'amo kreanta,
Kaj ĉie rechas al ĝi — haleluja!
De l'gento tutmonda, en lingv' Esperanta.

N. Hohlov.

KAREL ČAPEK:

FABRIKEJO DE ABSOLUTO.

Ĉap. II. Karburatoro.

Riĉa entreprenema industriisto Bondy legas ĵurnalan anoncon, ke iu Marek vendus inventaĵon. Li rememoras pri sia iama lerneja kolego Marek kaj kun la espero, ke la inventinto estas la sama persono, verŝajne mizere situita, kadukiĝinta, li decidis viziti lin kun la intenco, eble helpi lin. Sekvas dialogo, en kiu speciale atentinda, krom la enhavo mem, estas la formo de parolmaniero de Bondy, komence neglekta, poste suspekta kaj fine strange ekscitita. La kaŭzo de la stranga efiko en la kelo estas priskribata en la III. ĉapitro, kiun ni alportos en la venonta n-ro.

„Mi atendis vin!“ ripetis Marek sidiginte la gaston en ledan klubseĝon. Por nenio sur la mondo Bondy estis konfesonta siajn iluziojn pri la kadukiĝinta eltrovinto.

„Vidu“, li ekĝojis iom afekte, „kia hazardo! Hodiaŭ matene, sciu, venis al mi la penso, ke mi ne vidis vin jam dudek jarojn! — Dudek jarojn, pensu, Rudo!“

„Hm,“ dubis Marek. „Vi do volas aĉeti mian inventaĵon?“

„Aĉeti?“ diris hezite G. H. Bondy. „Mi vere ne scias... Mi eĉ ne ekpensis pri tio. Mi volis vin vidi kaj —“

„Mi petas vin, ne afektu!“ inter-

rompis lin Marek. „Mi sciis, ke vi venos. Por tia afero certe. Tia inventaĵo estas iel ĝuste por vi. El tio estas eble tiom profiti,“ li svingis la manon, ektusis kaj strikte komencis:

„La inventaĵo, kiun mi prezentos al vi, signifas pli grandan renverson de la tekniko ol la invento de la vapormaŝino de Watt. Por koncize indiki ĝian esencon: ĝi celas — teorie dirite — perfektan utiligon de la atoma energio...“

Bondy ekoscendis kaŝe. „Kaj mi petas, kion vi faris dum tiuj dudek jaroj?“

Marek ekrigardis iom surprizita. „La moderna scienco asertas, ke la materio t. e. atomoj konsistas el grandega nombro da energio-unuoj; atomo estas fakte arigo da elektronoj, tio estas la plej malgrandaj elektraj eroj.“

„Tio estas trege interesa“, interrompis lin la prezidanto Bondy. „Vidu, mi ĉiam estis malforta en la fiziko. Sed vi aspektas malbone, Marek! Sed kiel vi envere akiris tiun ĉi ludil — hm, tiun ĉi fabrikejon?“

„Mi? Tute hazarde. Inventinte novan specon de draĵoj por elektraj lampejoj — Ĝi estas nenio, tion mi trovis nur preferire. Sciu, mi jam dudek jarojn laboras pri forbruligado de la materio. Diru mem, Bondy, kio estas la plej granda problemo de la moderna tekniko?“

„Komerco“, diris la prezidanto. „Kaj ĉu vi jam estas edziĝinta?“

„Vidviĝinta“, respondis Marek kaj salte stariĝis ekscitite. „Neniel la komerco, komprenu! La forbruligado! La perfekta utiligo de la varmo-energio, kiu troviĝas en la materio! Konsideru, ke el la karbo ni en varmo ricevas sole centmilonon de tio, kion ni povus ricevi! Ĉu vi komprenas tion?“

„Jes, la karbo estas terure multekosta!“ opiniis saĝe S-o Bondy.

Marek sidiĝis kaj diris incitite: „Se vi ne venis pro mia karburatoro, Bondy, vi povas foriri.“

„Daŭrigu nur“, aldonis la prezidanto plena da pacemo.

Marek metis la kapon en la manojn. „Dudek jarojn mi laboris pri tio“, pene aŭdiĝis el li, „kaj nun mi tion vendas al la unua veninto! Mia grandega vero! La plej granda invento ĝis nun ekzi-

stinta! Serioze, Bondy: ĝi estas miregiga afero!"

„Certe, konsiderante niajn malgrandajn cirkonstancojn“, konsentis Bondy.

„Ne, ĝenerale miregiga. Ekpensu nur, ke oni povas utiligi la atoman energion tute senreste!“

„Aha“, diris la prezidanto. „Ni hejtos per atomoj. Nu, kial ne. Ĝi estas bela ĉe vi, Rudo; malgranda kaj bela. Kiom da laboristoj vi havas?“

Marek ne aŭskultis. „Vi scias“, li parolis en pensoj, „estas egale, kiel oni diras: ‚utiligi la atomenergion‘ aŭ ‚forbruligi la materion‘, aŭ ‚disrompi la materion‘! Vi povas tion nomi, kiel vi volas.“

„Mi preferas la forbruligon“, diris S-o Bondy; „tio sonas tiel intime.“

„Sed pli preciza estas, frakasi la materion; sciu, frakasi la atomon je elektronoj, kaj la elektronojn jungi por laboro, ĉu vi komprenas tion?“

„Perfekte“, konsentis la prezidanto, „nur jungi ilin.“

„Prezentu al vi, ke du ĉevaloj sur ambaŭ finoj de ŝnuro plenforte tiras al malsamaj direktoj: Ĉu vi scias, kio ĝi estas?“

„Videble ia sporto“, opiniis S-ro Bondy.

„Ne, sed trankvilo. La ĉevaloj tiras, sed ne iras. — Kaj se vi tranĉas la ŝnuron —“

„— la ĉevaloj falas“, ekkriis entuziasme G. H. Bondy.

„Ne, sed ili diskuras; ili fariĝas liberiĝinta energio. Kaj nun rigardu: tia jungita ĉevalparo estas la materio. — Tranĉu la ligilon, kiu kunigas la elektronojn kaj ili —“

„— diskuros!“

„Jes, sed vi povas ilin kapti kaj jungi, vi komprenas? Aŭ prezentu al vi la jenon: ni hejtas, ekzemple per karbopeco. El ĝi ni ricevas iom da varmo, sed krom tio cindron, gason kaj fulgojn. La materio ne malaperas per tio, ĉu vi komprenas?“

„Jes, ĉu vi volas cigaron?“

„Ne. Sed la restanta materio enhavas ankoraŭ multegon da nekonsumita atomenergio. Se ni konsumus absolute ĉiun atomenergion, ni per tio konsumus ankaŭ la atomojn. Mallonge: la materio malaperus.“

„Aha. Nun mi tion komprenas.“

„Estas same, se ni malbone muelas grenon; se ni formuelas la supran ŝelon kaj forĵetas la ceteron, kiel ni forĵetas cindron. Ĉe la perfekta muelo restos el la greno nenio aŭ preskaŭ nenio, ĉu ne? Kaj same, ĉe la perfekta forbruligo restas el la materio nenio aŭ preskaŭ nenio. Ĝi fariĝas tute. Ĝi konsumiĝas. Ĝi revenas al la origina nenio. Sciu, la materio bezonas grandegan kvanton da energio por tio, ke ĝi ekzistu; forprenu ĝian ekziston, igu ke ĝi ne estu, kaj per tio vi liberiĝos grandegan provizon da forto. Tiel ĝi estas, Bondy.“

„Aha, tio ne estas malbona.“

„Pflüger, ekzemple, kalkulas, ke unu kilogramo da karbo enhavas dudektri bilionojn da kalorioj. Mi opinias, ke Pflüger troiĝas.“

„Certe.“

„Mi venis teorie ale sep bilionoj. Sed eĉ tio signifas, ke unu kilogramo da karbo, perfekte forbruligita, povus movi sufiĉe grandan fabrikejon dum kelkcentoj da horoj!“

„Je diablo!“ ekkriis S-o Bondy kaj salte stariĝis.

„Mi ne indikos al vi la precizan honombro. Mi forbruligas jam dum ses semajnoj unu duonkilogramon da karbo ĉe ŝarĝo de 30 kilogramometroj kaj, aŭdu homo! ĝi moviĝas senĉese — senĉese — — senĉese — —“, flustris inĝeniero Marek paliĝante.

La prezidanto Bondy, embarasita, karesis sian mentonon, ĝlatan kaj rondan kiel infana postajeto.

„Aŭdu, Marek“, li komencis hezite, „vi estas certe iom laborlaca.“

Marek svingis la manon. „Ha, negrave. Se vi estus nur iom sperta en la fiziko, mi klarigus al vi mian karburatoron, en kiu mi forbruligas. Sciu, tio estas tuta ĉapitro el la supera fiziko. Sed vi tion vidos malsupre en la kelo. Mi ŝutis unu duonkilogramon da karbo en la maŝinon, fermis ĉion poste kaj sigeligis tion notarie, antaŭ atestantoj, por ke neniu povu aldoni karbon. Iru tion rigardi, iru, iru jam! Vi tion eĉ poste ne komprenos, sed — iru en la kelon! Homo, iru jam!“

„Ĉu vi mem ne iros?“ demandis Bondy mirante.

„Ne, iru sola. Kaj — aŭdu, Bondy... ne restu tie longe“.

„Kial?“ demandis Bondy, iom suspektante.

„Ial. Pensu eble, ke... ke ne estas sane tie. Kaj lumigu al vi tie la elektran lampeton, la butono estas tuj apud la pordo. La bruvo en la kelo, tio ne estas mia maŝino; tiu laboras tute senbrue, senhalte, senodore... Tie bruas nur, hm, nur ia ventolilo. Nu, iru jam, mi atendos ĉi tie. Poste vi rakontos al mi...“

La prezidanto Bondy malsupreniras en la kelon, iom ĝoja, ke li por momento liberiĝis de tiu frenezulo (estas ja nenia dubo, ke estas frenezulo) kaj iom angora pro la penso, kiamaniere malaperi plej rapide. Jen, vidu, la kelo havas kalfatritan, ege dika pordon, tute kiel kirasa kasa ŝranko en bankoj. Bone, eklumigu. La butono estas tuj apud la pordo. Meze de la volbita, betona kelo — pura kiel monaĥeja ĉelo, kuŝas grandega kupra cilindro, sur betonaj stabloj. Ĝi estas ĉie fermita, sole supre estas kradeto, garnita per sigeloj. En la interno de la maŝino — senlume kaj senbrue. El la cilindro, per regula kaj glifa movo elkuras piŝto, malrapide movigante pezan inertradon. Jen ĉio. Sole la ventolilo bruas en la kela fenestro per nelaciĝanta movo.

Eble ĝi estas pro la blovo de la ventolilo, aŭ kio, — S-o Bondy sentas sur la frunto strangan bloveton kaj ian senton, ke liaj haroj hirtiĝas; nun ĝi estas, kvazaŭ li estus portata tra la senfina spaco; kaj nun, kvazaŭ li flugus, ne sentante la propran pezon. G. H. Bondy genuas en ia mirega, pura feliĉego, li volus krei kaj kanti, ŝajnas al li aŭdi bruon de senlimaj kaj sennombraj flugiloj. Kaj subite iu lin rapide kaptas je la mano kaj tiras lin el la kelo. Estas inĝeniero Marek, havanta maskon aŭ skafandron kiel subakviĝisto kaj trenanta Bondy sur la ŝtuparo supren. En la antaŭĉambro li deprenas la maskon kaj forviŝas la ŝviton, ĝute brilantan sur lia frunto.

„Estis la plej urĝa tempo“, li elspiras terure ekscitita. (Daŭrigo.)

El la ĉefa: Rud. Hromada.

SV. CECH:

EL „KANTOJ DE SKLAVO“.

VII.

La sinjoro skurĝon levas,
svingas super sklava spin',
siblon ĝian akompanas
li memfide per esprim':
„Jen rigardu, belaj nodoj
sur rimenoj de vipil',
kvazaŭ aro da viperoj
zigzagantaj en sunbril'!

Aŭdu belan harmonion
de serpenta sibla son'!
Viajn dorsojn ĝi avidas,
kiel karnon la leon'.
Ke kruela malpli ŝajnu
al vi la venena dent',
jen belsonan donos nomon
mi al ĉiu ĉi serpent'.

Nodo, Religio nome,
diras: Servu sen rezist'
la sinjoron, vin kompensas
post la morto — paradiz'!
Kaj ĉi ŝnuro estas Juro,
led' el via haŭt', kaj tekst'
sanga sur ĝi estas: Estro
estas mi, sed vi — nur best'!

Nod' alia: Tradicio,
Moro apud la Kutim',
ja eĉ Liberec' troviĝas
tie kun Pacem', Estim'.
Jen Kulturo, Humaneco,
Virto tie, Vero jen —
Bele sonas sur la skurĝo
nom' de ĉiu ĉi rimen'!

Patrojn eĉ praavojn viajn
vipis tiu rimenar',
kiel dignan heredaĵon
ĝin sankciis mila jar';
se vi volas, baptos mi ĝin
eĉ laŭ nova bapt-kutim',
mia pugno ĝin ja svingos,
via dorso sentos ĝin!

El la ĉefa: J. Ježek.

O. D. RIBAULB:

VIVAĴOJ — NIAJ FRATOJ.

Infana dekjara — mi ludis en nia duonsovaĝa ĝardeno, imagante min en iu tropika virgarbaro. Mi grimpis arbojn, rampis tra arbustoj..., subite, mi vidas neston, je mia alteco. Reteninte la spiron, mi proksimiĝas: griza birdeto tie sidas, rigardas min akre per siaj brilaj okuletoj. Tiu rigardo kun „homa“ esprimo min haltigas; senmova mi tenas la okulojn sur la birdeto... poste mi malrapidege foriras, forglitas, dorsantaŭen, la okuloj alforĝitaj sur la ineto. Morgaŭ mi ree venis vidi mian birdeton, ree ŝi akre rigardis min, ree mi estis time-ma. Poste, mi komencis alporti panerojn, vianderojn (ho ve, la vegetarismo estis al mi, infano, ne konata), pecetojn da kazeo... ilin mi gardeme metis sur randon de la nesto. Sekvanta tago montris ilian malaperon. Mi ĝojis, do la birdeto manĝas... Unufoje, mi estis pli kuraĝa: mi tenis la ereton ĉe la beko, kaj la ineto englutis... Mi entuziasmis. Post tio ni tute amikiĝis: mi venadis regule matene, proponis la eretojn, ĝi manĝis, mi karesis ŝian dorseton, kape-ton. Okazis foje, ke je la matena vizito iu alia birdeto, samkolora, iom pli granda, kun ruĝaj (eble mi videraris) okuloj, sidis sur la rando... kaj fulmerapide forflugis ĉe mia apero. Mi komprenis: ĝi estis „li“. Tamen nia amikeco ne aliiĝis. Baldaŭ mi devis forveturi por du semajnoj al najbara vilaĝo, kien prenis min la panjo. Post du semajnoj mi revenis, je tagmezo, kaj tuj mi kuris la ĝardenon por vidi „ŝin“. Nova spektaklo: en la nesto mi ekvidis kvin grizajn kapetojn, ne ŝin. Mi gardeme proksimiĝis, alkliniĝis... kaj... subite, brrr... la birdidoj disflugis, la nesto iĝis malplena... mi kuris post la birdidoj, murmurante: „mi ne volis tuŝi vin, mi estas via amiko, mi konas vian panjon...“ sed la idetoj kaŝis sin en la herbo... Ekploregis mi, spasme, larmabunde... la neriparebla akcidento ŝajnis al mi terura... la nesto por ĉiam orfa, kaj „ŝi“..., kion ŝi faros ĉe la reveno?... mi elkuris el la ĝardeno. Dum pluraj tagoj mi revenadis al la nesto, sed ne plu estis tie la familio da najtingaloj, kies patrino restas en mia memoro por ĉiam, kiel vivanta pruvo ke la birdoj estas

niaj fratoj. Kaj poste, kiam mi iĝis plenaĝa, kiomfoje la bestoj sentigis al mi ke ili ĉiuj, kune kun la homoj, estas nur eroj de la universala vivo, disfluita en la mondo... Kiomfoje mi estis vekata el mia lito al la sunluma mateno dank' al la gaja kantado de l'paseroj, paruoj... Zaborovski, sekvante la teoriojn de Darwin, pruvas ke la homoj estis iomgrade lernantoj de la bestoj, precipe de la birdoj, en... la lingvo. Kaj vere, kiam aperis sur la tero la unuaj homoj, la regno de la birdoj jam ekzistis prospere. Do, la unuaj homoj estis profunde impresataj de la miloj da birdoj kiuj kantis, fajfis, pepis, blekis, ĝrakis, turtumis, esprimante mil nuancojn, mil aferojn de sia birda vivo: la danĝerojn kaj la plezurojn, la alvokojn kaj la anoncojn. Nu, la homo, tre imitema kiel ĉiuj infanoj, nature provis imiti la birdojn, kaj lia imitado fariĝis lia unua balbuta, kantota, ĝermo de la vera lingvo. Do, la birdoj estis niaj unuaj profesoroj de la lingvo; nun ili (papagoj, merloj, ktp.) lernas de ni la frazojn, sed ĉiam ili estis niaj fratoj. Fiera homo. Ĉi neas sian parencecon kun la bestoj... sed kial cia korpo entenas samajn ripojn, pulmojn, vejnojn, koron, intestaron... kiel ĉiu korpo de la rano, kato, hundo? Ambicia homo. Ĉi malestimas la bestojn, sed kial por laŭdi heroon ci diras: leono, por esprimi noblecon ci diras: aglo, por nomi belan kantiston ci nomas: najtingalo, por aludi laboremon ci citas: formiko, por la saĝeco ci nomas: serpento? Ho, simple pro tio ke la bestoj estas cial prapatroj, ke ci prezentas en si ĉiuspecajn kvalitojn de la bestoj, pro tio ke la homo estas nur la resumo de la tuta bestaro. Do, rekonu la parencojn viajn, kaj agu kun ili kiel kun viaj fratoj.

La sanktaj libroj de Hindujo diras: la animo vivas sama en la korpoj de insekto, elefanto, homo, birdo. La bramanismo instruas ke la monado (animkerno) migras de l'vivo al vivo, tra diversaj korpoj, jen homaj, jen bestaj. Tiuj doktrinoj restas por ni enigmoj, sed ke la bestoj estas niaj fratoj, tion povas vidi ĉiu kiu volas rigardi.

Zaslal jsem již předplatné?

EL ĈEĤOSLOVAKIO

La fabriko Škoda en Plzeň faris kontrakton kun la urbo Ŝanghaj pri konstruo de gasfabriko. La sama entrepreno liveros nun ankaŭ al Ĉinio lokomotivojn kaj materialon por konstruo de pontoj.

La urbon Praha vizitis dum 1927 sume 443.991 personoj, kresko je pli ol 80.000 kompare kun la 362.701 vizitintoj en la jaro 1926. El la supre nomita nombro estis 358.107 ĉeĥoslovakoj kaj 85.884 eksterlandanoj. El Germanio venis 29.132 personoj, el Aŭstrio 18.409, el Usono 6.205 kaj el Polujo 4147. Dum la jaro 1926 vizitis la ĉefurbon 61.372 fremduloj, je 24.500 malpli.

La piedpilkista klubo Vršovice, kiu sub la nomo Bohemians faris pasintjare sukcesan rondvojaĝon tra aŭstraliaj urboj, ludos dum 1928 en Suda Afriko kaj ricevis ankaŭ inviton al Kanado.

8 kremaciejoj estas en Ĉeĥoslovakio. Dum la lasta jaro 3756 kremacioj estis en ili faritaj, je 293 pli ol en la jaro 1926. Laŭ religio estis 52% romkatolikoj, 23% senreligiĝiaj, 14% apartenis al ĉeĥoslovaka eklezio, 8% estis protestantoj kaj 2% hebreoj.

Dek jaroj de Ĉeĥoslovaka respubliko. La jubileo de la proklamo de sendependa Ĉeĥoslovaka ŝtato, okazinta la 28-an de oktobro 1928, estos festita en diversaj oficialaj solenoj. En Praha estos dum tiu jaro krome multnombraj aliaj publikaj aranĝoj, kiuj alvenigos al la urbo certe multajn vizitantojn. Dum majo estos Paska muzika festivalo kaj Jubilea ekspozicio de la Ĉeĥa agrikultura societo. Por julio estas destinita Internacia kongreso por desegnado kaj por arta eduko, al kiu aliĝis precipe multaj anglaj kaj amerikaj edukistoj. Dum la sama monato okazon en Praha Tutslava kongreso de fajrobriĝadistoj. En la amerika Tago de la Sendependeco estos inaŭgurita la monumento de la usona prezidanto Wilson kontraŭ la ĉefa stacidomo, kiu portas lian nomon.

Ekspozicio de ĉina arto, de verkoj modernaj kaj antikvaj, estis aranĝita en Praha de la pentristo Chytil, kiu estis dum kelkaj jaroj profesoro en la pekinga Akademio de artoj.

Printempa Foiro de Praha (18.—25. de marto) estas laŭ la ricevitaj aliĝoj nova sukceso. Laŭ nombro de la ekspozantoj kaj laŭ la okupata spaco ĝi estas unu el la plej grandaj el la ĝisnunaj. Okazas diversaj specialaj ekspozicioj de diversaj fakoj kaj ŝtatoj. Parto de la venonta foiro en aŭtuno 1928 estos verŝajne jam lokita en la nova granda palaco ĵus finkonstruata.

Ĝ.
Ĉeĥa scienculo prof. Dro V. Nechvíl, astronomo de ŝtata observejo en Praha, ricevis de Akademio de Sciencoj en Parizo Lalande-premion 1927 por astronomio. Tiu ĉi premio rekompencas francan aŭ eksterlandan scienculon „por la plej interesaj observoj, aŭ verko la plej utila por progreso de astronomio”. h.

Pasportan vizon Ĉeĥoslovakio ne bezonas verurante al Danzig, Francujo, Lucemburgo, Portugalio kaj Svislando. h.

Klubo de ĉs. turistoj ekzistas 40 jarojn, havas 284 lokajn grupojn kun 60.000 membroj. Ĝi estas posedanto de 45 kaj administranto de 17 ripozdomoj. La klubo markis 23.000 km da turistaj vojoj. h.

La klopodoj de Granda Britujo kaj Germanujo por kontraŭbatali la krizon pri loĝejoj.

Informations sociales (Industrial and Labour Informations), la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, publikigas interesajn ciferojn pri la klopodoj faritaj en Germanujo kaj Granda Britujo por kontraŭbatali la krizon pri loĝejoj.

En Germanujo, per la popolalkalkulado de la 16-a de Majo 1927, oni povas taksii ĉirkaŭ unu miliono la nombron de la loĝejoj nepre bezonaj. La konstruado de loĝejoj, kiu progresis sufiĉe rapide en 1921 kaj 1922, kaj kiun la monaj malfacilaĵoj iomete haltigis dum la sekvintaj jaroj, poste rekomenciĝis kun nova intenseco. La pliiĝo de la nombro da loĝejoj estis 106.502 en 1924, 178.930 en 1925 kaj 205.793 en 1926. La lasta cifero ŝajne estos superata en 1927, se oni juĝas laŭ la statistiko de la unua duonjaro.

Oni devas tamen memori, ke la bezono pri loĝejoj ankaŭ kreskas rapide, kaŭze de la pliiĝo de la loĝantaro. Estas mezonombre 150.000 novaj familioj por loĝiĝi ĉiun jaron. Sekve, eĉ se la konstruado ankoraŭ intensiĝas, multaj jaroj pasos, antaŭ ol la problemo estos tute solvita.

En Granda-Britujo, kie la manko estis malpli granda, la konstrua aktiveco estas tia, ke oni povas esperi, ke la malabundeco de loĝejoj kreita de la milito malaperos en estonteco pli malpli proksima. Oni konstruis tie en 1923-4 86.210 domojn, 136.889 en 1924-5, 173.426 en 1925-6 kaj 217.629 en 1926-7. Entute 866.143 domoj estas konstruitaj de 1919 ĝis la unua kvaronjaro de 1927, el kiuj 545.287 kun helpa mono de la Registaro. Depost tiu epoko la Brita gazetaro anoncis la atingon de unu miliono da navaj konstruaĵoj. Oni devas ankaŭ atentigi pri la granda rolo ludata de la komunumaj aŭtoritatoj kiuj, dum la pasinta jaro, konstruis propraspeze 74.093 domojn.

POR KURSANOJ

Estu trankvila. — La ŝuldoj pereigas vin, mia kara nevo. — Bagatelo! Ne la ŝuldoj mem pereigas, sed nur la pagado de la ŝuldoj. Kaj tion mi neniam faros, estu trankvila.

Cu vi eltiris mian filon el akvo? — Jes! — Nu, mankas lia ĉapo!

Anna, laŭ kio vi rimarkas, ke kokino estas maljuna? — Laŭ la dentoj, sinjorina moŝto. — Kiel malsaĝe! Kokinoj ja ne havas dentojn! — Ne, sed mi!

El teatraj anekdotoj. Du esperdonaj modernaj dramverkistoj decidis kune skribi komedion; la sekvintan tagon ili estas komencontaj. — Cu vi jam havas ideon? — Ne. Kaj vi? — Ankaŭ ne.

— Nu, ni ne perdu do tempon. Ni komencu skribi.

Juna aŭtoro legas sian teatraĵon al Tristan Bernard. Bernard pacience aŭskultas. Fine, kiam la aŭtoro estas fininta, Bernard demandas: Kaj kiel ĝi do finiĝis? Kio okazis pri la heroino? — Ŝi venenis sin. — Mi konsilas al vi, ke ŝi pafu sin. Gravas ja ĝuste la bruo. Estas ja necese vekti la publikon.

Dialogo de du teatro-direktoroj en tempo de la kino: — Kiel estis hieraŭ ĉe vi? — Ses. — Mi loj? — Ne personoj.

Malamo de Whistler. Oni scias, ke la fama pentristo Whistler kaj verkisto Ruskin ne vivis amike. Whistler persekutis Ruskinon eĉ al tribunalo. Iu sinjorino, amikino de Ruskin kaj samtempe ŝatanto de Whistler, riproĉis al la pentristo, ke lia malamo al la fama angla kritikisto estas tro granda. „Kial vi estas tiom incitita kontraŭ la maljunulo, kiu per unu piedo staras en tombo?“ ŝi demandis lin. „Oh“, respondis simple Whistler, „tiu piedo ne estas kaŭzo de mia malamo!“

Konsolo. Patrino, plektante la manojn super la fruoplena pantalonon de sia filo: „Ree vi inferbatiĝis kun Joĉjo? Nun necesos iri kaj aĉeti al vi novan pantalonon!“ Filo: „Vi devus vidi Joĉjon, pajno! Mi timas, ke lia patrino devos iri kaj aĉeti al si novan knabeton!“

Kiom da lingvoj ekzistas? Estas malfacile diri tion. La plej modernaj fakaj verkoj diras 860, el kiuj 53 en Eŭropo, 153 en Azio, 115 en Afriko, 422 en Ameriko kaj 117 en Aŭstralio. Kompreneble, multaj lingvoj estas parencaj. Ekzemple, iuj scienculoj opinias, ke ĉiuj afrikaj lingvoj havas komunan originon en ia afrika pralingvo. Plie, ekzistas rilato inter lingvoj eskimaj la nordaziaj mongolaj, kaj tiu ĉi parenceco atingas Eŭropon per lingvoj finna, lapona, magiara kaj turka, Indion per la draŭida, kaj Polinezion per la malaja.

Uĉebnice:

- Dr. Šilha: Uĉebnice esperanta. Schvál-
lena ministerstvem školství Kč 10.60
při větším množství slevy.
H. K. Bouška: Škola esperanta Kč 31.—
J. Šupichová: Uĉebnice esperanta Kč 10.20
Ždárský-Procházká: Uĉebnice Kč 21.—
J. Bednář: Esperanto, váz. Kč 15.50
Bouška: Krátký kus esperanta Kč —50

Slovníky:

- Kühnl-Procházká: Slovník česko-esp.
váz. Kč 25.—
Čánský-Riedl: Slovník esp.-čes. Kč 21.—
Hromada-Petr: Slovník esp.-čes. Kč 6.80
Čánský-Riedl: Frazologický slovník Kč 5.50
Čefeč: Klíč esperanta Kč —50
Grosjean-Maupin: Vortaro franca-esp.
váz. Kč 24.—
Bennemann: Vortaro Esper.-Deutsch,
váz. 159 str. Kč 30.—
Bennemann: Vortaro Deutsch-Esper.,
váz. 455 str. Kč 60.—
Wüster: Enciklopedia Vortaro, dosud
3 sv. po Kč 120.—
Wüster: Maŝinfaka vortaro, 89 str. Kč 16.—
Wüster: Zamenhof-Radikaro Kč 48.—
Kabe: Vortaro, váz. Kč 18.—

CITAJOJ EL „BIBLIO“.

Sankta Mateo.

Tial ĉiu arbo, kiu ne donas bonan frukton, estas dehakata kaj ĵetata en fajron.

Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron.

Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio.

Ĉion tion mi donos al vi, se vi faligos vin kaj adorkliniĝos al mi.

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Ne provizu al vi trezorojn sur la tero, kie fineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafos kaj ŝtelas.

Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj.

Kaj kial vi rigardas la lignereton en la okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon en via okulo?

Ĵetu, kaj estos donite al vi; serĉu kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi.

Sinjoro, savu, ni pereas.

Malsanulojn sanigu, mortintojn levu, leprulojn purigu, demonojn elpelu: donace vi ricevis, donace donu.

Kion vi eliris en la dezerton por rigardi? Ĉu junkon skuatan de la vento?

Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon? Aŭ kion homo donu interŝanĝe por sia animo?

Sekve ili iam estas ne du, sed unu karno. Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu.

Estas pli facile por kamelo iri tra trueto de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio.

Mia domo estos nomata domo de preĝo; sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj.

Amiko, kiel vi envenis ĉi tien, ne havante edziĝofestan veston?

Ĉar multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj.

Redonu do al Cezaro la proprajon de Cezaro, kaj al Dio la proprajon de Dio.

Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso.

Amu vian proksimumon kiel vin mem.

Kaj kiu sin plialtigos, tiu estos humiligita; kaj kiu sin humiligos, tiu estos plialtigita.

La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.

Ĉar mi malsatis kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda kaj vi gastigis min; nuda kaj vi vestis min; mi malsanis kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo kaj vi venis al mi.

Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi.

Prenu, manĝu; ĉi tio estas mia korpo.

Vere mi diras al vi, ke en ĉi tiu nokto, antaŭ ol krios koko, vi trifoje malkonfesos min.

Tre malĝoja estas mia animo, eĉ ĝis morto; restu ĉi tie kaj viglu kun mi.

Remetu vian glavon en ĝian ingon; ĉar ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos.

Kaj krucuminte lin, ili dividis inter si lian veston, jetante lotojn.

Eli, Eli, lama sabahtani? tio estas: Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min?

Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero.

Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.

LA VIVA BAZO DE NIA LINGVO.

Popolo estas la viva bazo de lingvo kiu en popolo ĉerpas siajn vivigajn sukcojn, kiu por popolo ekzistas. Pratempaj popoloj, sovaĝaj kaj malriĉaj, estis kreantoj de unuaj langaĵoj, de primitivaj idiomoj. Nur poste aperis scienculoj kaj instruistoj, kiam la lingva bazo jam ekzistis. Se hodiaŭ ni parolas Esperanton, ni tion ŝuldas al homoj kiuj vivis antaŭ mildekoj da jaroj, al sovaĝaj popoloj kiuj naskiĝis embriane lingvon, prapatron de la hinda-eŭropana.

Simpla popolo kreis sian lingvon, la sama popolo konservis ĝin pli aŭ malpli fidele. Se la arĥaika lituva lingvo, valorega por scienco, konserviĝis por ni, ni tion ŝuldas al la lituvaj kamparanoj kaj arbaruloj, kiuj ĝin gardis pie kiel solan antikvan heredaĵon, transdonitan de buŝo al buŝo, dum longa vico da jarcentoj. Sed kie estas la lituva nobelaro, tiu, kies praavoj brilis dum regado de Gedimino kaj Vitaŭto? Ili jam delonge portas fremdajn nomojn — rusajn, polajn aŭ germanajn! Kiam osmanoj subjugis la Serbujojn en la XV-a jarcento, la serbaj nobeloj islamiĝis por ne perdi siajn privilegiojn, dum la popolo gardis la kredon de la praavoj. Nun, post la granda milito, kiam pseŭdopatriota nesatigebla ŝovinismo, en kelkaj landetoj, penas ekstermi ĉiujn patrolingvojn krom la regna, tiam la superaj klasoj estas unuaj kiuj renegas sian

lulilan lingvon, pro materia profito, dum ĝin konservas la popolo, ĉar ĝia lingvo estas ĝia sola riĉaĵo. Vortoj precizaj, sciencaj, estas kreaĵoj de kabinete de l'eruditoj. Vortoj poeziaj, bildaj, estas kreaĵoj de la popolo. Kiam popolo ĉesas paroli la lingvon, ĝi iĝas morta, malgraŭ la scienculoj kiuj ĝin uzas. La latino estas morta lingvo, kvankam milionoj da lernantoj ĝin studas. La eskima, aŭ la vogula, estas vivanta lingvo, malgraŭ tio ke apenaŭ kelkmil uloj ĝin parolas.

Esperanto ankaŭ, ĝi havas sian polon, negrandan, sed certe plinombriĝantan. Tiu popolo konsistas en modestuloj, kiuj uzas la lingvon, sen pretendo esti verkistoj, estroj aŭ fakuloj. Tiu popolo estas nia fiero kaj nia espero. Ni ĉiuj tre volonte identigas nin kun la popolo. Sed ĝi ne identigas sin kun ni. Laborante por Esperanto ni laboras por nia popolo, sed ĝi tion malmulte sentas. Ĉar la popolo ŝatas simplan, solidan kaj utilan laboraĵon, dum ni proponas al ĝi la komplikitan, kapriceman, senutilan produktaĵon. La popolo ne volas legi lliadojn, Eneidojn kaj Bovludojn, ĉar ĝi ilin ne komprenas. Ĝi ŝatus havi en la manoj ilustritan astronomion, praktikan botanikon aŭ metian lernolibron. Ĉar la naturo kaj la vivo estas senfine pli mirindaj kaj pli riĉaspektaj ol la „Mil kaj unu noktoj“. Ĉu ni malaprobos pro tio la eldonadon de antikvaj poemoj kaj fabeloj? Tute ne! Tio estas bona afero. Sed ankoraŭ pli bona estus eldonado de elementaj faklibroj pri natursciencoj kaj praktikaj artoj. — Kredu, ke multaj malgrandaj popoloj ankoraŭ ne havas bonajn elementlibrojn, kaj por ili la esperantaj eldonoj povus esti tre utilaj.

Ankaŭ en nia lingvo ni devas atentigi pri la popolo. Ni laŭdas facilecon de Esperanto. Do, ni ne trompu la polon, farante nian lingvon malfacila pro centoj kaj centoj da novaj radikoj, ofte senutilaj. Iu esperantisto-laboristo bonege scias kio estas mono kaj teo, ne diru do al li pri monoteismo kaj politeismo, ĉar li povas mokridi vin. Vortojn unudiismo kaj multodiismo li certe komprenos. Se li komprenas vorton pasero,

ne parolu al li pri pirgito! Ĉu ni devas forigi el nia vortaro tiajn vortojn kiel la cititaj? Tute ne; sed verkante elementlibrojn ni devas eviti tiajn vortojn. Simpleco en la lingvo estas do nia devo rilate la popolon. Esti simpla ne estas facila, oni do lernu tiun arton — esti simpla. Kaj tiamaniere ni alproksimiĝu nian popolon, ĉar sen ĝi ni ĉiam restos „senfrukta oazo en la dezerto“. Kun ĝi ni estos vivanta organaro kiu povos disvolviĝi kaj kreski senfine.

P. Stojan.

Rekomendindaj libroj

Fundamento eldono 5 lingva	Kĉ 8.—
Fundamento, kun ĉefa trad.	Kĉ 3.—
Fundamenta Krestomatio	Kĉ 20.—
Fabeloj de Andersen I., II. po	Kĉ 12.—
Gergo Dandin	Kĉ 6.—
Hamleto, Shakespeare, 170 str.	Kĉ 10.—
Ifigenio, Goethe, 108 str.	Kĉ 12.—
Proverbaro esperanta, 82 str.	Kĉ 10.—
Rabistoj, Schiller, 144 str.	Kĉ —.
Revizoro, Gogol, 100 str.	Kĉ 12.—
Rabeno de Baharah	Kĉ 8.—
Marta	Kĉ 20.—
Lingvaj respondoj	Kĉ 10.—
Faraono Bol. Prus, 3 sv. 600 str.	Kĉ 48.—
Halka, opera, text	Kĉ 6.—
Interrompita Kanto	Kĉ 3.—
Makbeto Shakespeare	Kĉ 12.—
Kaatje, el la flandra 111 str.	Kĉ 12.—
Fatala Ŝuldo, teosofický román — 318 str.	Kĉ 22.—
Reĝo Judea	Kĉ 18.—
Mona dologio de Leibnitz 31 str.	Kĉ 2.—
Vortfarado, de Ĉefeĉ	Kĉ 4.—
Vortaro de oficialaj radikoj de Cart, 32 str.	Kĉ 2.20
Klasika libro de esp-o, 120 p.	Kĉ 6.—
Vade-Mecum de Int. Farmacio, Rousseau, 228 p. v.	Kĉ 26.—
Angla lingvo sen profesoro Tr. Bernard, unuaktajo	Kĉ 4.—
Aspazio, Svienstochowski, 157 str.	Kĉ 12.—
Laŭroj, kolekto de primiitaj verkoj, 138 p.	Kĉ —.
Mistero de Doloro, kataluna dramo, 96 p.	Kĉ 8.—

Al kluboj. En E. K. Praha estis aranĝitaj du belaj katalunaj vesperoj. Bildan materialon pruntis prof. Dalmau kaj poeto Grau Casas el Barcelona, informoj pri kataluna historio, lingvo, literaturo estis prenitaj de la parolinto, D-ro Parma, el Kataluna Antologio. La materialo estis estis ekspoziciota dum la kluba jubileo kaj nun ĉiu klubo, kiu volus aranĝi similan vesperon, povas ĝin ricevi prunte. Skribu al CAE.

LINGVA FAKO

POSEDANTO — PROPRULO. II.*

La supre menciitaj nocioj estas transprenitaj en la modernan juron el la antikva roma juro, kiu diferencigis inter detentor (tenanto), possessor (posedanto) kaj dominus (proprulo). Ekzemple la ĝenerala civila leĝaro de la iama aŭstria imperio difinis en § 309 la menciitajn nociojn jene:

„Wer eine Sache in seiner Macht oder Gewahrsame hat, heisst ihr Inhaber. Hat der Inhaber einer Sache den Willen sie als die seinige zu behalten, so ist er ihr Besitzer.“

La ĉefa oficiala traduko de la menciita teksto estis jena: „Kdo věc ve své moci neb ve svém schování má, slove její majitel. Má-li majitel vůli, podržeti věc za svou, jest držitelem jejím.“

La tenado kaj posedado estas faktaj statoj, kiuj estas tute sendependaj de la jura stato de propreco. Proprulo povas, sed ne devas teni aŭ posedi sian proprajn kaj male tenanto aŭ posedanto de iu aĵo povas, sed ne devas esti ĝia proprulo: ekz. ŝtelinto aŭ kiu aĉetis ŝtelitan aĵon, estas ĝia tenanto kaj posedanto, sed li ne fariĝas ĝia proprulo; la vera proprulo rajtas re-postuli sian proprajn. Aŭ se iu proprulo de muelejo ekspluatigas sian muelejo de luprenanto (pachtýř), la luprenanto estas ĝia tenanto (majitel), sed ne ĝia posedanto (držitel), ĉar li ne volas teni ĝin kvazaŭ sian proprajn, la proprulo (vlastník) restas la ludoninto. Nefakuloj intermiksas ĉi tiujn fakajn esprimojn dirante: majitel mlýna — Mühlenbesitzer ankaŭ, se temas pri propruloj.

Do „posedanto“ estas tradukota „držitel“; „proprulo“ „vlastník“ sed neniam majitel; „tenanto“ „majitel“, sed neniam držitel, ĉar estas neeble uzi por du diversaj nocioj la saman fakan esprimon. Ĉu la esprimo proprulo estas ĝusta, decidu LK; Christaller mencias la esprimon „propraĵulo“, la aliaj de li uzitaj esprimoj ne povas

*) Vidu p. 94. jk. 1927.

kontentigi fakulojn. Ĉu ne estus eble analoge al: „fumo — fumaji“ derivi „propra — propraji“? Poste oni povus diri: „propraĵanto“.

Rimarko de la unua proponinto. Mi legis kun vera ĝojo la suprajn klarigojn kaj mi, konsentante kun ili, konsilas al legintoj sur paĝo 49 (X-a jaro) streki ĉe la traduko de Proprulo la vorton majitel, kaj anstataŭi per tiu ĉi vorto la držitel ĉe Tenanto. — La esprimon Proprulo mi trovas daŭre pli oportuna kaj pli taŭga ol proponitaj derivaĵoj. Cetere ĝi estas en vortaro Grosjean-Maupin (Esp. - fr.); Benne-mann (germ - esp.) havas: propreculo.
S. K.

Pŭsobiĵi, agi, efiki, agir,  tre appliqu 
en kemia kaj fizika senco.

sila pŭsobi na bod A, la forto agas sur la punkton A, *la force agit sur le point A*
sily pŭsobiĵi na t eso, la fortoj agantaj sur la korpon, *les forces agissant sur le corps*
sily pŭsobiĵi na jeden bod, la fortoj agantaj sur unu punkton, *les forces appliqu es   un m me point*

l tka pŭsobi jako oksidliĉovadlo, redukovadlo, katalysator, la ŝtofo agas kiel oksidilo, reduktilo, katalizanto, *le corps agit comme oxydant, reducteur, catalyseur*

luĉavka kr lovsk  pŭsobi jako zdroj chloru, akvo reĝa efikas kiel fonto de kloro, *l'eau r gale agit comme une source de chlore*

l tka pŭsobi podle rovnice, la ŝtofo efikas laŭ la ekvacio, *le corps agit suivant l' quation*
pŭsobiĵi energicky, velmi mocn , efiki energie, tre forte, *agir energiquement, d'une mani re brutale*

pŭsobiĵi na n co n ĉim, efiki je io per io *agir sur qch par qch*

kyselina a alkohol pŭsobi na sebe vz jemn , acido kaj alkoholo reakcias reciproke, *l'acide et l'alcool r agisse l'un sur l'autre*

pŭsobiĵi na n co n ĉim, reakciigi ion je io, *faire r agir qch sur qch*

pŭsobiĵi teplem, d ti pŭsobiĵi teplo, agi per la varmo, *faire agir la chaleur*

pŭsobiĵe bromem na benzol, oni agas per bromo je benzeno, *on fait agir le brome sur le benz ne*

pŭsobiĵe-li magnetickym polem na . . . , se oni agas per magnetkampo je . . . , *en faisant agir un champ magn tique sur le . . .*

pŭsobiĵi na sebe navz jem, influo sin reciproke, *s'influencer r ciproquement*

pŭsobi ŝkodliv  na fermenty efikas malutile je fermentoj, *il exerce une action nuisible sur les ferments*

tlak pŭsobi na . . . , la premo efikas sur . . . , *la pression s'exerce sur . . .*

odpudiv  sila, jeŝ pŭsobiĵi mezi dv ma t esoy, la centrifuga forto, kiu agas inter la du korpoj, *la force repulsive, qui existe entre les deux corps*

d ti pŭsobiĵi sile na n co, igi agi forton je io, *appliquer une force   qch.*

S. K. (Laŭ vortaro de Votoĉek.)

KONSILOJ PRI ERAROJ

kiujn ni havis okazon legi en la lasta tempo

Lerni — instrui. Pozor na rŭzn y vyznam t ĉhto dvou slov: lerni = uĉiti se, instrui = uĉiti n koho. Mi lernas esperanton = uĉim se esperantu; mi instruas 10 personojn (pri esperanto) = uĉim 10 osob esperantu. Ve v t e „kokino lernis siajn idojn serĉi panon“, m  bŭti spr vn : „kokino instruis siajn infanojn serĉi panon“.

Statek ve smyslu hospod rstv  zem d lsk , dvŭr = bieno; statek ve smyslu majetek vŭbec = havaĵo. Straka krade ciz  statky = piĝo ŝtelas fremdan havaĵon.

Preĉe. Rekl jsem ti preĉe, abys to ned lal = Mi ja diris al vi, ke vi . . . ; A preĉe to ud lal = Kaj tamen li tion faris; Mi do diris al li = rekl jsem mu tedy.

Rampi je sloveso nepreĉodn  a znamen   esky: plaziti se. Kocour se plazil k vrabci = virkato rampis al pasero (nikoli: rampis sin!).

Predstavovati. Predstav mne sv mu pŭiteli = Prezentu min al via amiko. — Predstav si tu situaci = Prezentu al vi la situaci. — Tyto krouŝky na map  predstavuji m sta = La rondetoj sur la landkarto prezentas la urbojn. — Jeho predstavivost byla ohromn  = Lia fantazio estis grandega. — Myŝlenky predstavuji kvetouci sad = La pensoj prezentas florantan ĝardenon (estas kiel fl. ĝard.), nikoli imaĝas . . . ; Mi imaĝas = mi prezentas al mi.

Na. Pŭjdu na proch zku = Mi iros promeni. Pŭjdu na ob d na faru = Mi iros tagmanĝi en la paroĥejon.

Prelodite:

Bar! senĝena trinkejo, startrinkejo, likvortrinkejo nekvystihuj  dosti dobre druh z bavn  m stnosti, u n s takto pojmenovan .

Prohnan  podvodnik.

Na mou duŝi!

Ŝel tam na slepo.

23. text k prekladu. Jelikoŝ preklad uveřejnime aŝ v pŭŝt m  isle, prodluŝujeme lhŭtu aŝ do 31. bŕezna. Ŭĉastn ete se v hojn m poĉtu!

Dek demandoj. Lhŭta konĉi 31. bŕezna. Nezapomeňte poslat odpov di!

Kongresaj glumarkoj, artoplenaj, eldonitaj de LKK Antwerpen estas haveblaj por 6 K  (100 markoj). Ŭzu sur viaj korespondaĵoj. Por ŝpaci al niaj abonantoj la elspezojn de eksterlanda afranko, ni kolektas mendojn ĝis 31. Marto kaj poste sendos amasan mendon al Antwerpen.

LA 14a DE APRILO — TAGO DE LA ORIGINALA ESPERANTA LITERATURO.

La aranĝita antaŭ nelonge Unua Festo de la Esperanta libro certe estis grava sukceso. Ĝiajn statistikajn ciferojn montru al ni ĝia iniciatinto — sinjoro Julio Baghy. Sed eĉ se tiuj ciferoj ne tute kontentigus nin, en komparo kun la ĝenerala nombro de la tutmondaj samideanoj — ni tamen rajtas diri, ke ĉie, kie la Festo estis aranĝita laŭplane kaj siatempe — ĝi havis tre kontentigan sukceson. En tiu sukceso estu al ni pli da rekompenco ol en la relativa cifera materialo.

Kontentaj estas laŭplane agintaj societoj, libroeldonejoj kaj vendejoj. Bona komenco estis farita kaj ni daŭrigu persiste kulturi kaj propagandi la ideon de nia ŝafata poeto.

Sed aĉeti almenaŭ unu libron unufoje jare, kio povus fariĝi sola kaj escepta bona kutimo ĉe cetra speco do niaj samideanoj, kaj poste ekdormi sur la laŭroj — vere ne estas tro multe.

Prave rimarkas „International Language“ de la britaj samideanoj, ke oni devus propagandi ke ĉiu samideano aĉetu almenaŭ unu libron ĉiumonate. Nur tia aĉetado senteble prosperigus nian literaturon.

Tamen ni ne iluziĝu nin kaj ne esperu, ke tio povus okazi tre baldaŭ. Por tia organiziteco ni bezonus multajn longajn jarojn de la plej persista propagando. Tiun propagandon ni certe ne povas havi nun kaj tial ni kontentiĝu per io pli reala.

Mi alvokas la tutmondajn samideanojn havi tiun Feston ne unufoje, sed dufoje ĉiujare. Ni havas du karajn datojn: la 15an de Decembro kaj la 14an de Aprilo. La datojn de la komenco kaj ĉesiĝo de la vivo de nia Majstro. Ambaŭ ili signifas al ni du grandajn tagojn kaj dum la ambaŭ ni sentas ĉie tra la mondo unu komunan senton. Tiuj datoj eĉ koincidas kun diversaj sezonaj aŭ religiaj festoj ĉe multaj kulturaj popoloj.

Sed por ne ripetiĝi, ni proklamu la daton de la 14a de Aprilo

Tago de la originala esperanta literaturo.

Ĉio kio ne estis tradukita en nian lingvon el iu alia, sed estis verkita rekte en ĝi — havu rajton esti proponafa kaj vendata en tiu tago. Aĉeru specialaj listoj de la originalaj verkoj en Esperanto.

Ni havu nian propran, bonan, valoran literaturon kaj pro ĝi fariĝu gravega unika tutmonda faktoro, kiu ne nur peras, sed ankaŭ kreas kaj klerigas laŭ sia propra universala vidpunkto.

Nur subtenante niajn originalajn verkistojn, ni samtempe rajtas postuli de ili, ke ili verku interese, bonstile kaj moderne. Nur tiam ni pretendu havi verajn laborantojn de la literatura plumo, kiuj altigos nian lingvon kaj kulturos ĝian stilon pli ol iuj teoriaj lingvistoj.

Dufoje dum jaro doni sian obolon — ne estas multe. Sed por nia originala Esperanta literaturo tio signifus preskaŭ ĝian renaskiĝon.

N. Hohlov.

Znâte orig. romány esp. ?

Forge: Abismoj, 150 str. brož. Kč 24.— váz. 36.—

Luyken: Pro Iŝtar, 304 str. váz. . . . Kč 56.—

Forge: Saltego trans jarmiloj, váz.

192 str. Kč 36.—

Luyken: Stranga heredajo, 319 str.

Kč 40.— váz. 56.—

Jus aperis:

Baghy: Dancu Marionetoj! 176 p. 12

originalaj noveloj, brož. . . . Kč 18.—

lukse tole bindita Kč 30.—

NOVAJ ENKETOJ KAJ EKSPERIMENTOJ RILATE LA MONDHELPLINGVAJN SISTEMOJN.

La eksperimentoj fariĝas sur la bazo de kunlaborado inter

1. „IALA“ en New York kaj
2. „Instituto Jean Jacques Rousseau“ en Genève.

1. IALA estas la nomo por Amerika Asocio por Internacia Helplingvo (International Auxiliary Language Association in the United States, Incorporated.) Ĝi estas fondita en la jaro 1924 en New York kaj estas tute neŭtrala asocio, havanta kiel celon la enkondukon de unu helplingvo, kiu estu instruota al la lernantaro en ĉiuj landoj kiel taŭga rimedo por komuna interŝanĝo de pensoj inter personoj de malsamaj gepatraj lingvoj. Tiu celo postulas neŭtralan kaj objektivan esploron de la tuta mondhelplingva situacio.

Pro tio la laboroj de IALA etendiĝas sur du ĉefaj kampoj:

1. IALA klopodas interesigi grandajn rondojn por la helplingva movado;

2. ĝi faras esplorojn sur 3 kampoj:

- a) sociologia
- b) lingva
- c) pedagogia kaj eduka.

II. Rilate la 3an punkton IALA kunlaboras kun la Instituto J. J. Rousseau en Genève

